


# BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE  
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



No 9.

Decembro 1953

Aperas laŭbezone

Dro Kamarýt sepdekara.

Julio B a g h y salutas  
niajn klubanojn!

Dum la aliaj sin amuzis,  
profiton tiris, eĉ misuzis,  
vi instruadis, oratoris,  
redaktis, verkis: Vi laboris.

Dum la aliaj sole ŝajnis,  
flatojn, titolojn, rangojn gajnis,  
vi organizi nur preferis  
kaj zorge gvidi: Vi oferis.

Dum la aliaj ... tion flanke.  
Al Vi ni ĉiuj pensas danke,  
Danke rigardas en okulon.  
Do dankon! Dankon! Kaj Gratulon!  
Eli Urbanová

Responde al nia letero li skribas  
i.a.: ... El Via letero, kvankam Vi  
klopodis resti seka raportanto - venis  
freŝa alblovo, optimisma admono al mi  
kaj al miaj amikoj, al kiuj mi legis  
Vian leteron. Ne miru! Ni ja tute ne  
havas okazon kaj ejon por kunvenoj, kaj  
nur hazardoj renkontigas nin jen  
surstrate, jen ĉe iu oficejo ktp.  
Kvankam ni iom envias la ĉeĥoslovakajn  
esperantistojn pro eblecoj, kiujn ni ne  
havas, tamen ni ĉiuj tre ĝojas, ke  
persisto kaj entuziasmo por tia  
kulturmovado, kies utilon eble eĉ timas  
tiuj, kiuj ŝatas prediki pri

internacia homa solidareco... Tamen la historia evoluo pravigos nin.  
..... iam ankaŭ en nia urbo prosperis tiel la kluba vivo kaj dank' al tio eĉ nun  
ekzistas tiom da celkonsciaj adeptoj, kiuj sufiĉas por rekomenci la laboron ....  
Ni atendas la momenton, kiam la kultura miopeco ne plu malhelpos la disvolviĝon  
de sopiroj, kiuj deziras havi faktan rimedon por krei pacon, justecon kaj homan  
solidarecon inter la popoloj.

.... nun estas mia vico peti vin, ke Vi ne forgesu transdoni la salutojn kaj plej  
sincerajn bondezirojn al viaj klubanoj, al viaj kunlaborantoj kaj al ĉiu  
samideano, kiu akcelas ĉu per studo, ĉu per laboro nian movadon. Esperon!  
Esperantista klubo en Praha firme tenante torĉon kun verda lumo ripetas la  
saluton! Esperon!

GRAVA ATENTIGO!

NOVA KUNVENEJO!

Ek de la 25a de novembro 1953 okazas ĉiumerkredaj kunvenoj de Esperantista klubo  
en Praha en kafejo OLYMPIA, Praha III./Malá Strana/ Vítězná třída.

-!-!-!-!-!-!-

ESPERANTISTA KLUBO EN STOKHOLMO atingis en tiu ĉi jaro 55 jaroj de sia ekzistado!  
EK en Praha esprimas al sia sveda frato plej sincerajn bondezirojn. Kun admiro  
kaj respekto ni rigardas Vian klubon.

Esperantista seminario en Lanškroun okazos de la 13a ĝis 20a decembro 1953 en  
"Dům osvěty". Aranĝas Esperantista rondeto - Junularo en Lanškroun. 50%a  
fervojrabato! Demandojn kaj aliĝojn adresu al Esp. rondeto: s. Naďa Jirečková,  
Školní 128, Lanškroun.

Zamenhof-monumentoj aŭ Esperanto-monumentoj, stratoj, placoj, memortabuloj aŭ  
memorŝtonoj estas multaj en tuta mondo. Kiom da ili estas en ĈSR? Por kompletigi  
ilian nomaron ni tre petas niajn legantojn, ke ili donu al ni koncernajn  
informojn - se eble eĉ bildeton (ilustr. poŝtkarton). Ne forgesu, skribu tuj!

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA kunvenas ĉiumerkrede je la 20a horo en kafejo OLYMPIA en Praha III - Malá Strana, Vítězná třída (proksime al ponto de Legioj).

Programoj de decembraj kunvenoj

9.12. La stelo de Smetana - muzika fabelo. Trad. Sidonie Dlouhá kaj J. Zemek.  
Prelegas J. Zemek

16.12. Z a m e n h o f a v e s p e r o .

23.12. Antaŭkristnaska kunveno. Libera tribuno.

30.12. La lasta kunveno de la jaro: J. Zemek rakontas pri sia gaja travivaĵo en Persujo.

Donacoj por ebligi pluan eldonadon de la Bulteno: Paperon sendis:

Milda Jakubcová, Brno - Aug. Čambál, Martin - Ant. Slanina, Praha - Ant. Satttek, Příbor - Hubert Slavík, Brno - Frant. Svačina, Lanžhot - Alojz D.Kremer, Košice - K.Tichota, Karlovy Vary - Dr.Frant.Vaněk, Nová Role - Dr.Stan.Kamarýt, Chotěboř - Ján Lamačka, Trenčín. Ne havante eblon donaci la paperon, sendis monon: Ant. Kodytek, Nové Město n.M. Kčs 20.- Nekonata samideano el Praha Kčs 10.- A.Csáder, Bratislava Kčs 10.- Al ĉiuj donacintoj elkoran dankon!

Kion neni povas - Esperantistoj povas! Konata vero, multfoje pruvita! Ĉu esperantistoj en Praha kapablas trovi loĝejon por juna esperantista paro? ... kaj se ne loĝejon, do almenaŭ ĉambron meblitan aŭ nemeblitan. Samideanoj helpu! La proponojn sendu al Jar.Šustr, Praha I., Dlouhá 10.

Novaj kursoj: Praha: kurso por komencantoj - 15 partopren., gvid. A.Slanina  
Přerov: por komencantoj 26 partopren., por progres. 17 partopren. Nový Bor: por komencantoj - 18 partopren., gvidas R.Enzel. Lanškron: por komencantoj.

Kiu deziras helpi en agrabla laboro de granda signifo por la estonta ĉsl. Esp. movado? Bonvolaj kunlaborantoj, posedantaj skribmaŝinon - laŭeble en Praha anoncu sin ĉe s. O.Ginz, Nad cementárnou, Praha-Podolí, telef. 930326.

Kolekto el ĉeĥa poezio, tradukita en ĉinan lingvon el Ĉeĥoslovaka antologio, estas urĝe serĉata. Kelkajn ekzemplerojn disvendis la librovendejo de EAĈSR kaj ni nun urĝe bezonus rehavi almenaŭ unu libron. Por tiuj, kiuj ne scias bone la ĉinan lingvon, ni klarigas, ke la libro estas en blua kovrilo. Interŝanĝe ni povas doni ĉinan kolekton el ĉeĥa prozo (en flava kovrilo), tradukitan ankaŭ el ĈA, aŭ ni pagos la postulatan sumon. Proponojn sendu al s.Jar.Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

Esperantský zvukový film v barvách s názvem "Dnešní Australie" dala zhotoviti australská vláda a zapůjčuje jej bezplatně do celého světa.

Esperanto a věda. Za německé okupace vyšel v Utrechtu fotometrický atlas slunečního spektra, sepsaný holandským odborníkem Wineartem v holandštině a v esperantu.

Přerovský uzel - uzina gazeto de la ĉefa stacidomo Přerov, alportas en sia 9a nro de la 12a de oktobro kvaronpaĝan artikolon "Co je Esperanto?" kun informoj pri kunvenoj kaj kurso. Presita informo favora pri nia lingvo estas nun maloftaĵo en Ĉeĥoslovakio. Vivu la vigla Interesrondeto ĉe la fervojista uzina klubo en Přerov, de kiu ni aŭdas pri sukcesa propagando en montraĵ fenestroj de la urbo. Kunvenoj ĉiumarde je la 18a horo en klubejo ROH, ĉefa stacidomo Přerov.

Aitaro Yamanoi estas japana esperantisto, kiu lernis antaŭ proksimume 40 jaroj ĉeĥan lingvon kaj tradukis en japanan lingvon plurajn verkojn el ĉeĥa literaturo. Ni serĉas ĉiujn detalojn pri lia vivo kaj laboro. Skribu al s-o. O.Ginz, Nad cementárnou 10, Praha-Podolí.

Okaze de la proksimiĝanta nova jaro 1954 ni deziras al niaj membroj kaj legantoj en la tuta mondo sanon, prosperon kaj daŭran bonhumoron! Esp.klubo Praha.

Proksima numero (januara) aperos sur kvar paĝoj.